kaj abomeno, de hezito kaj ekpreno. Neniu iam parolis pri ĝi; mia koro eble ne sciis ĝin for; sed ĉu mi ĉi starus antaŭ vi kiel Prokuroro, se tiam, sinjoroj, du manoj min surprizis kaj kaptis kaj kondukis antaŭ la infanĵuĝiston, kiel dekoj kaj dekoj da popolinjanoj estas kondukataj antaŭ lin kaj sendataj en punkolonion? Mi estos konciza, sinjoro Prezidanto, mi ne perdas la konkludon el vido, ĉar tiu viro kulpas kaj ne eskapos sian justan punon. Verŝajne pli bone ol vi, mi povas sekvi la motivaĵojn kiuj pelis tiun ĉi viron al la krimo. Li suriris vojon, kiun multaj suriris antaŭ li kaj post li sekvos multaj; la vojon kiun mi mem... mi mem, sinjoroj, suriris je mia arda honto. Ankaŭ mia koro, tiu ŝajne netuŝita koro, foje amis; la ŝtormoj de la fatala pasio ankaŭ konservis ĉi tiun karnon (en la ĉambrego ree : « silenton,

konis la tenton pri kiu Dante poezis en sia Inferno : Soli eravamo e senza alcun sospetto... ni solis kaj neniel suspektis; kaj mi voĉlegis por ŝi. Kaj iom post iom niaj vangoj trovis unu la alian kaj niaj okuloj devojiĝis, kaj miaj fingroj ludis per argenta juvelo sur la varma alabastro de ŝia kolo... »

Tiumomente la emocio ŝnuris lian gorgon, du dikaj larmoj fluis laŭ liaj malgrasaj vangoj sur lian pendkolumnon, kaj en la ĉambrego la silento tiel kompletis ke li sentis la froston de la kvieto premi lian ardan vizaĝon. Kiam li ree kapablis paroli, li nur diris plus :

« Ankaŭ ni tiun vesperon ne legis pli; sed en la ebena argento de altpreza juvelo tiuj ĉi fingropintoj konturigiĝis, silentaj kaj neniam videblaj atestantoj de nia tro homa kaj kulpa alianco. »

En la ĉambrego zumado kovris la senspiran silenton, kiel la subita ŝaŭmado de abondanta akvo. La sinjoro Prezidanto denove ekstaris, senespere skuante la kapon kaj supran korpon por ke la publiko ne prenu vera kion la sinjoro Prokuroro rakontis en videble nerespinda stato. Mi ĉesigas la kunsidon, li diris. Sed en la ĉambrego voĉoj kriis, kiel ordonon : resti, resti kaj la Prokuroro jam plu parolis : Kiurajte, sinjoroj, mi poste ankoraŭ postulis punon kontraŭ la malfidelaĵo? Malfidelo estis la unua paŝo kiu, malrapide sed certe, pelis la akuziton al la krimo. Vi ne lasos lian agon senpuna. Eble vi, tro indulgaj, opinios la homan malforton kaŭzo por apliki malplikulpigajn cirkonstancojn. Mi ne oponos. Sed nenia malforto, sinjoroj, povas ekskuzi la atencon kiun mi kulpis kontraŭ mia propra ofico, kiu ĉi-loke paroligas min nome de la socio kaj de la ofendita ordo. Ankaŭ tion, sinjoroj, vi ankoraŭ aŭdis; tiam mi povos, kun liberigitaj animo kaj konscienco, malmodi tiun ĉi vualon kaj por ĉiam demeti tiun ĉi talaron. »

« Ankaŭ tiun faron la fingropintoj markis en la impreseblan malmolon de la metalo... Ie kuŝas ŝlosileto, en la profundo de rivero. Jam antaŭ jaroj, iun nokton, malkvieta pro la multaj steloj, ŝajne senzorga mano ĵetis la ŝlosileton en la sinon de la akvo. Neniu vidis la geston, neniu scias kien la rivero kondukis la ŝlosileton, sed ie ĝi kuŝas... Eble ĝi kaŝigis en alĝoj kaj koto, eble la tajdo drivigis ĝin maren. Eble la rusto korodis ĝin kaj la moviĝado de la maro eluzis la arĝenton, sed miaj fingroj retrovus la malnovajn spurojn, kiujn ili brulstampis en ĝin. Ni enketis en domo, kiun mi ne pli precize indikos; — vi komprenas, sinjoroj, kiel malfacile estas paroli tiel ke miaj diskretaj vortoj samtempe malkovru la sekreton pri mi, kaj vualu ĝin pri alia. Ni iris por enketi, kiel mi diris, kaj dum la enketo ĵuĝisto ordonis mezuri la dimensiojn de la dormoĉambro, mi restis momenton sola kun la kulpigatino en la salono. Tiam ŝi, kiun mi ne pli precize nomos, ĵetis sin sur mian kolon, superŝutis mian vizaĝon per la odoro kaj la abundo de siaj kisoj kaj larmoj, anhelante ŝi ilustris sekreton en mian oreton, kaj poste rekisis min sur la okuloj, la vangoj kaj la buŝo. Kaj kiam la enketjuĝisto revenis kaj daŭrigis la pridemandon, mi ŝajne senzorge eniris la buĉaron, tiam... — ferminte la pordon — rapida kiel rabisto mi ŝteliris al la mahagona ŝranketo... la tria tirkestro maldekstre, ŝi diris... kaj la ŝlosileto... la argenta ŝlosileto... en la dana vazeto sur la librobretareto... Faru, diktis voĉo en mi, faru... Mi ne scias, sinjoroj, la demonon kiu posedis min en tiu momento kaj paralizis ĉiujn miajn kontraŭstaron kaj abomenon. Eble mi malgraŭe ne estus senhonoriginta tiun ĉi talaron, sed tiumomente mi aŭdis la singultadon de la akuzitino, kiu batalis por sia vivo kaj sia libereco. Estis kvazaŭ plejlata ĝemo de pafvundita besto, kiu povas esperi savon nur de unu mano... Kaj tiam, sinjoroj, tiam tiuj ĉi fingroj... la ŝlosileto... la ŝranketo... la ŝlosileto, sinjoroj... »

Tiam la Prokuroro falis malantaŭen en sian fotelon.

Notoj : Mane, Thekel, Phares (Tekel, Fares) : kalkulita, pesita, dividita. Profeta minaco mistere skribita sur muro de la salono kie la babilona reĝo Baltazaro lastafoje orgiis kaj anoncanta lian pereon (538 antaŭ Kristo).

Inferno (= Infero) : unua parto de la « Dia Komedio », la fama verko de Dante (1265-1321).

AUGUST VAN CAUWELAERT

« Ik geloof in de goedheid en het Offer. »
 (« Mi kredas al la boneco kaj la Ofero »).

La 4-an de julio pasinta li sternis sian lacan korpon por eterna kvieto; en antverpena malsanulejo li brave kaj serene, kiel li vivis, akceptis la morton, plejlastan oferon.



Omaĝante ĉi tiun paĝon al tiu tipa Flandro, mi povus resumi lian tutan vivon : « li estis bona, li estis katoliko, li estis verkisto » kaj ne eblus al mi disigi tiujn tri trajtojn.

Ĉiu, kiu frekventis lin, polican pacjuĝiston aŭ privatan homon, sentis lian bonecon en liaj gestoj, lia parolo, liaj verdiktoj, eĉ en lia staturo. Neniam mi vidis lin kolera, ekscesa, kaj la plej

tiklan advokaton imponis lia indulga sereno.

Li estis sincera katoliko, kun larĝa, tolerema spirito kaj li ne limigis sian vidon, kripligante la realon : ĉu li ne konis la homon kaj ties mankojn : malforton, pasiojn, ribelojn sed ankaŭ ties penton kaj bonvolon? Kaj ĉu lia fortika kredo ne malkovris al li la veran sencon de tiu enigma miksaĵo?

Lian bonecon kaj katolikismon spegulas liaj verkoj.

Membro de la Reĝa Flandra Akademio de Lingvo kaj Literaturo kaj de la Flandra Kultura Konsilantaro, ĉefredaktoro de la « Dietsche Warande en Belfort » li estis poeto : « Verzen I en II » (Versoj), « Liederen van Droom en Daad » (Kantoj de Revo kaj Ago) kaj precipe « Liederen voor Maria » (Kantoj por Maria) montris lin aminde simpla kaj plej bona religia lirikisto. La novelaro « De Rechter vertelt » (La Ĵuĝisto rakontas) kaj liaj romanoj « Het Licht achter den Heuvel » (La Lumo malantaŭ la Monteto) kaj poste « Harry » rivelis pioniran stilon kie la rakonto mem ombras la atmosferon kaj la priskribon. Kelkaj eseoj, nome pri Karel van de Woestijne (kune kun G. Gezelle flandra poeto de monda famo) kaj freŝdate « De Romancier en zijn Jeugd » (La Romanverkisto kaj lia Juneco) signas penetreman observanton de niaj beletristoj.

La suba teksto estas fragmento el la lasta novelaro de A. Van Cauwelaert « De Rechter vertelt opnieuw » (La Ĵuĝisto denove rakontas, 1944), daŭrigo de la citita unua volumo. Ĝi estas tradukita kaj ĉi tie presita kun la bonvola permeso de liaj heredantoj.

D.ro T. van Gindertaelen.

« Ankaŭ mian vivon, li plu diris, du fingropintoj poreterne brulstampis : unue kiam mi ankoraŭ estis infano kaj lernanto en edukpensiono, due kiam mi faris mian provotempon kiel advokato ĉe tiu ĉi tribunalo, trie kiam mi — maldigna — jam staris ĉi-loke postulanta punon pri la kulpo de aliaj. Jen, sinjoroj, kial mi rompas la silenton. Lastafoje mi portas ĉi tiun talaron (en la ĉambrego : « silenton, silenton ») kaj la naciajn kolorojn ĉirkaŭ la lumbo. »

« Ie en la mondo estas arĝentmonereto en kiun la du fingropintoj, kiujn mi levas super mian kapon kiel brulantan karbon, markis mian kulpon kaj mian honton. Ĝi pasis en multaj manoj, ĉien ĝi vojaĝis, sed la fremdaj manoj kiuj ricevis kaj ree elspezis ĝin, ne sentis la markojn kiujn mia kulpo presis en ĝin. Tiu arĝentmonereto, sinjoroj, ankaŭ ne apartenis al mi; iun matenon, kiam la aliaj lernantoj jam iris al la kapelo, mi vidis ĝin en dormoĉelo de kunstudanto. Estis preterfluga momento de tento kaj kontraŭstaro de avido

silenton ». Mi diskrete parolos... al la perfido kontraŭ la edzo kaj samtempe la amiko, mi ne aldonos la ofendon de maldiskretaj vortoj. Ĉar inter la lipoj kiujn mi ekstaze kisis kaj la lipoj, kiuj diras tiun ĉi konfeson, signis sian minacon la morto. Si ankoraŭ tiel junis kaj gracie parigis la logon de la knabino kaj unuan floradon de la virino. Nur antaŭ duo da jaroj ŝi edziniĝis kaj ŝi estis la patrino de knabineto. De la geedza vivo ŝi ne jam trapasis la unuan periodon, kiu por ĉiuj multaj iĝas la rifo kontraŭ kiun la feliĉo grundas; la monatojn inter blinda ravo kaj purigita harmonio, kiam du koroj, ankoraŭ ne sufiĉe dekutimiĝintaj de si mem, reciproke sin vundas per multaj dornetoj. Tiam mi eniris ŝian vivon; mi finis mian advokatan provotempon. Mi travidis ŝian malpacan kaj divenis ŝiajn kaŝajn larmojn; kaj ŝi kliniĝis al mi kiel la ĉiro volvigas ĉirkaŭ subtenilo. Mi konis la beaton de miaj lipoj sur du plorantaj okuloj kaj la ravan forton de du ŝirmaj brakoj. Sed iun vesperon, dum foresto de ŝia edzo, ni

Van Hier en Elders

ANTWERPEN. — Voor een aandachtig en talrijk gehoor sprak Sano G. De Boes op Woensdag 7 November i.l. in het Esperanto-Domo der Lange Leemstraat 127, over « Kiel ni povas efike propagandi Esperanton ». Het was beslist een der leerrijkste avonden door E.K.I. aangeboden. Onder de aanwezigen werd kamerdier L. Frensen opgemerkt.

De reeks voordrachten in Esperanto wordt op Woensdag 5 December a.s. voortgezet door Sano J. Jacobs, een der vooraanstaande figuren uit de Esperantobeweging der Scheldestad, die spreekt over « Mia renkontigo kun D-ro L. L. Zamenhof »!

Op Zaterdag 15 December a.s., om 19.30 u., in de feestzaal « Van Dijk », Korte Nieuwstraat, geven de Esperantistenverenigingen van Antwerpen gezamenlijk een groot feest bij gelegenheid van Zamenhofdag. Bekende radio- en toneelartisten verlenen hun medewerking, o. a. de dames Willy Claessens, Maria De Herdt, Lia Lucassen, de heeren Maurice Goossens, Jaak Fabre, Gustaaf Mertens en het choregrafisch ensemble van de dansschool Lea Daan. Kaarten à 10 fr. zijn te bekomen in het Esperanto-Domo. Voor dit feest blijkt reeds groote belangstelling, ook in de Esperantistenkringen buiten Antwerpen.

Te Antwerpen zijn nu ook terug bedrijvig de afdelingen Antwerpen, Deurne en Merksem van de Federatie (F. L. E.). Daarmee is het aantal plaatselijke Esperantistenverenigingen alhier tot zeven gestegen!

BLANKENBERGE. — Op de vergaderingen wordt voor de leden een « refreŝiga kurso » gegeven bij middel van den Appko-leergang in 25 lessen.

Door leeraar Fr. Couwenberg wordt in een lokaal der middelbare school een elementaire wintercursus gegeven voor een twaalftal leerlingen volgens de directe methode, aan de hand van het leerboek van Szilagy.

Met het raambiljet van F. E. I. en met mededeelingen in de locale pers wordt propaganda gevoerd door onze plaatselijke vereniging « Norda Stelo ».

BRUGGE. — Een buitengewoon propaganda-offensief wordt op touw gezet met het oog op de winterleergangen die op 10 December in een nader te bepalen schoollokaal zullen aanvangen.

Op 9 Dec. worden de leden der plaatselijke Esperantistenvereniging « Paco kaj Justeco » op een hypnotisme-avond ver gast!

BRUSSEL. — In de « Vlaamsche Club voor Kunsten, Wetenschappen en Letteren », Em. Jacquainlaan 121 (boven Standaard-Boekhandel), zal op Maandag 17 December a.s., om 19.30 u. een **debat-avond** over Esperanto doorgaan. Als spreker zal optreden leeraar Ed. Symoens. Bij deze gelegenheid wordt in de lokalen van de « Vlaamsche Club » een aangepaste Esperanto-tentoonstelling geopend die veertien dagen zal toegankelijk blijven (de Vrijdagen uitgezonderd). Men kan schriftelijk om toegangskarten voor den debat-avond verzoeken bij F. E. I., Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West.

Op Dinsdag 8 Januari begint om 20 u. een Esperanto-cursus in de lokalen van de « Brusselse Zwemvereniging », Em. Jacquainlaan 124 (2^e verdieping). Belangstellenden kunnen zich schriftelijk melden bij F. E. I.

Op Maandag 17 December a.s. om 20 u. : Zamenhofherdenking aangeboden door E. K. I. in het lokaal « Deux Bécasses », Boterstraat 40, nabij de Grote Markt.

Te Sint-Pieters-Jette leidt Sano A. van den Brande een reeks cursussen voor 60 nieuwe, enthousiaste adepten!

GENT. — Het dansfeest der Gentsche Esperantisten was een groot succes. Cursussen zijn nu aan gang voor beginnelingen in de school der Onderstraat en in de Volkshoogeschool der Tarbotstraat waar ook een leergang voor gevorderden, door leeraar J. Fr. Mortelmans wordt gegeven.

LEUVEN. — Door ons lid H. J. Boving wordt uitstekende propaganda gevoerd in de plaatselijke pers. Een cursus voor philatelisten is in voorbereiding.

JAĤTO VETURAS EL...

« KRIMINALA ROMANO »

Verkis : Deck Dorval.

El la flandra : D-ro T. Ken

CAPITRO 6-a.

« Nu, » Kant interrompis la doloran silenton.

Jean Dubois lace lasis sin fal en fotelon ĉe la lito. Dikaj ŝviteroj perlis sur lia frunto.

« Mi senkulpas », li mallaŭte diris, sed lia voĉo tremis kaj liaj okuloj angore rigardis kvazaŭ tiuj de ĉaspelata besto.

« Mi timas, ke estos malfacile al vi pruvi tion », froste respondis la inspektoro, « kie vi estis ĉi-vespere, aŭ, pli ĝuste, hieraŭ-vespere? »

« Ĉi en mia kajuto. » Senkurage sonis.

« Ĉu vi estis sola? »

« Jes. »

« Do neniu povas konfirmi vian aserton? »

« Ne! » La respondo estis apenaŭ aŭdeble flustrita. Dubois sentis kiel li iom post iom ŝpiniĝis en la fatalan reton.

« Kiel tiu butono iĝis for de via jako? »

« Mi ne scias!... Mi ne scias! »

« Kiel mi rimarkis, vi ĉiam kutimas alvesti vin post la tagmanĝo? »

« Jes, plejofte. »

« Kial ne ĉi-vespere? »

« Car... ĉar tiu butono mankis al mia jako. »

« Kiam vi rimarkis tion? »

« Volante surmeti ĝin. »

« Kiam tio estis? Precize? »

« Post la ŝakludo. Mi ne atentis la horon. »

« Kial vi murdis Maxton? »

Tiu abrupta atako tondrobate venis.

Dubois saltrektigis. Liaj okuloj dangere briilis.

« Mi ne murdis lin! Mi scias nenion pri tio... Ne, mi scias nenion pri tio. »

Li ree lasis sin fal en la fotelon.

« Mi ĵuras tion... mi ĵuras tion... »

« Tio ne sufiĉas. Oni trovis butonon de via jako, prematan en la pugno de la viktimo, kaj ĉio, kion vi povas rakonti, estas ke vi estis ĉi en via kajuto, sola. Tio ne eblas, tion vi mem ja sentas! »

Dubois mallevis la okulojn, kvazaŭ serĉante ion sur la planko.

« Mi... mi ne estis en tiu ĉi kajuto!... » li fine eligis.

Kant palpebrumis, kaj iom nekredeme demandis :

« Kie do vi estis? »

« Mi estis ĉe... iu. ĉe virino... »

« Ĉe kiu? »

La respondo forrestis.

« Senutile pristudi viajn pantoflojn, sinjoro Dubois », Kant senkompate plu diris.

« Ĉe kiu virino? »

« Ĉe... ĉe fraŭlino Sterlen. »

Kant profunde enspiris.

« Ne necesas diri al vi, ke viaj deklaroj estos kontrolitaj. »

Dubois konsternis silentis. Lia kapo ankoraŭ pli kliniĝis.

« Ĉu vi venis tien ĉi tuj post la ŝakludo? »

« Jes. »

« Estis, se mi ne eraras, ĉirkaŭ la dudektria. »

« Jes. »

« Kaj poste? »

« Tiam, volante alvesti min, mi prenis mian jakon kaj rimarkis ke butono mankas. Mi koleriĝis pro tio kaj ne povis diveni kie aŭ kiel mi perdis ĝin. Tial mi denove surmetis mian vesperveston. Mi lavis miajn manojn kaj purigis miajn dentojn kaj foriris dudek post la dudektria. »

« Kiel vi precize scias tion? »

« Mi rigardis mian horloĝon. Mi jam iom malfruis. »

« Kiun horloĝon? »

« La mian : jenan. » Li montris platan oran Hunter (14). Kant komparis ĝin kun la sia kaj konstatis ke tiu de Dubois malfruas tri minutojn.

« Kaj plue? »

« Sekve mi iris al la kajuto de fraŭlino Sterlen. »

« Ĉu iu vidis vin? »

« Ne. »

« Por kio vi iris tien? Je tia horo? » Kant maldiskrete demandis.

Dubois nerveze ŝoviĝis tien kaj reen en la fotelo.

« Ni rendezuis, vi komprenu. »

« Mi vidas ». La rimarkigo de Kant ironie sonis.

La kapitano Joost grumblis ion malbelan, sed Dubois ne reagis. Ĉio ŝajnis al li indiferenta.

« Mi... ni havis rendezuon... Ni volis babilu pri... pri io. »

« Nu, tiel! » Kant povis esti tre sarkasma.

« Kaj kiam vi forlasis fraŭlinon Sterlen? »

« Je noktomezo kaj duono. Stella... fraŭlino Sterlen, nome rimarkigis ke la nova tago aĝas duonhoron. »

« Ĉu la tutan tempon vi restis tie? »

« Jes. »

« Kaj la tutan tempon vi restis solaj? »

« Jes. »

« Ĉu vi ne aŭdis pafon aŭ ion tian... lom antaŭ noktomezo? »

« Ne. »

« Ĉu vi estis soldato? »

« Jes, mi estas rezervoficiro. »

« Ĉu vi scias uzi pistolon? »

Dubois grumblis ion kio devis signifi « jes ».

« Kial tiuj vestaĵoj tiel senorde kuŝas sur la lito? »

« Mi estis nerveza pro la butono kaj ĉar mi malfruis. »

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ

kun premioj

ATENJU : Legu en la unua aŭ dua numero la rimarkojn por la partoprenantoj kaj la informojn pri la premiosistemo.

SOLVO DE LA 6a ENIGMO.

1. Plutokrato. — 2. Letargio. — 3. Intervjuo. — 4. Bankiero. — 5. Oleandro. — 6. Nostalgio. — 7. Ekspluati. — 8. Invalido. — 9. Oksigeno. — 10. Oportuna. — 11. Limonado. — 12. Neologismo. — 13. Esperanto. — 14. Nepotismo. — 15. Inspektoro. — 16. Optimisto.

La proverbo: **PLI BONE IO OL NENIO.**

7-a ENIGMO : KRUCVORTO.

HORIZONTALA : 1. Aro da soldatoj komisiita por gardi (R) — Difekti (R); 2. Listo de muzikaĵoj ludataj de iu artisto (R); 3. Rado turniĝas ĉirkaŭ ĝi (R); 4. Senvestigi (R) — Bruligate, ĝi estas agrabla al la flarsento de multaj homoj (R); 5. Prepozicio — Inter naskiĝo kaj morto (R) — Fluidaĵo formiĝanta sur plantoj somere (R); 6. Parto de jako (R) — En alta grado; 7. Pli, malpli kugloronda, ne kulturita kernfrukto (R) — Fadenoj restantaj el ŝpinita kanabo, uzataj por ŝtopi (R); 8. Ĝi veturas surmare (R); 9. Konforma al la preskriboj proklamitaj de kompetenta ŝtata aŭtoritato (R) — Artikolo; 10. Pro menui ajn kaŭzo; 11. Persona pronomo — Ne perdi (R); 12. Insulte malbeni (R) — Sufikso.

VERTIKALA : 1. Municio (R) — Per ĝi oni ŝtopas difektitajn dentojn (R); 2. Ekkrio — Sufikso — Sufikso; 3. Prepozicio — Difini grandecon (R); 4. Prefikso — Tuto de instrumentoj de metiisto (R) — El kartaro (R); 5. Forigi sablon el haveno (R) — Grado de io, kompare al alia afero (R); 6. Verba finaĵo — Parto de kapo (R) — Kunjunktio; 7. Herbaĉo (R) — Vorto per kiu oni distingigas ion (R); 8. Prepozicio — Familiano (R) — Pompa (R); 9. Aziano (R) — Prepozicio; 10. Ornamenta kadraĵo ĉirkaŭ devizo, blazono, k.t.p. (R) — En ne konigita direkto; 11. Artikolo de la suda Eŭropo, kies vosto finiĝas per venena pikilo (R) — Hindoeŭropa (R); 12. Persona pronomo — Konjunktio — Eksplodaĵo (R).

ANONCETOJ

Minimumo : fr. 15.—
Ieder woord of aikorting : fr. 0.75

LA VERDA FLAMO, monata revuo por ĉiuj! Abonejo por Belgio : Sano M. Daems, Heyvaertstraat 159, Molenbeek-Brussel (poŝtkonto 3329.95). Jara abonprezo: 60 fr. Petu provekezempleron!

ANGLA JUNULO, 19-jara, ano de T.O.J., dez. korespondi kun samaĝaj Flandraj Esperantistoj pri ĉiuj temoj. Skribu al : Tpr. J. White, Pay Office, 57 th. T.R., R.A.C., Waitwith, Catterick Camp, Yorkshire, England.

MOOIE ESPERANTO - SLUITZEGELS. « Esperanto-Wereldvrede » in twee kleuren. 100 stuks : 25 fr. Publiciteitskantoor « De Schakel », Eiermarkt 43, Antwerpen. (Postrekening 4900.73).

JUNAJ GESAMIDEANOJ korespondu kun alilandaj gejunuloj. Skribu, menciante aĝon kaj inklinojn al T.J.O.-korespondacento : Ph. Cullus, Grand'Place, Braine-le-Château (Belg.). Aldonu poŝtmarkojn je valoro de 3.50 fr. kaj vi ricevos adresojn de korespondemaj alilandanoj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

Solvoj antingu la redakcion antaŭ la 10-a de decembro.

PREMIOJ : R. Iserentant kaj Verda atingis la sesan bonan solvon kaj sekve akiris la belan premion « Luno de Izrael ». Ni tutkore gratulas al ili!

« H'm! » Kant butonumis sian jakon. « Sinjoro Dubois, mi lasas vin en kompanio de tiuj du sinjoroj. Mi timas ke mi devos ĝeni la revojn de tiu virino. »

Stella Sterlen ne loĝis fore.

Kant devis ripeti ja trifoje sian frapadon antaŭ ol timoptena voĉo demandis tion kio okazis.

« Estas Kant. Bonvolu apenti, fraŭlino, urĝas. »

Preskaŭ tuj la pordo malfermiĝis kaj li enpaŝis.

Fraŭlino Sterlen provis per unu mano kaŝi sian belan korpon en ribela silkka kimono, dum en la alia mano ŝi premis savzonon.

Angone sonis ŝia demando : « Ĉu la ŝipo alfundiĝas, sinjoro Kant? »

Tiu lasta fermis la pordon malantaŭ si antaŭ ol respondi :

« Tute ne, fraŭlino. Mi tamen devas urĝe paroli al vi. »

La bele formitaj brovoj de Stella Sterlen iris supren en kreskanta miro.

« Ĉu vi kutimas, sinjoro, tiel invadi la dormejon de virino en plena nokto? »

El ŝiaj vortoj Kant povis malfacile decidi ĉu ŝi indignas aŭ amuziĝas.

« Kutime ne, fraŭlino! Sed ĉifoje necesis. »

« Kaj? » La savzono estis formetita.

La inspektoro atentis ĉiun movon.

« Ĉu sinjoro Dubois ne plu estas tie? »

« Sinjoro Dubois? Ne, kiel vi pensas pri tio? »

« Mi opiniis ke mi vidis lin eniri ĉirkaŭ la dudektria kaj duono? »

« Vi certe eraris kaj nun mi devas vin... »

Kant ne lasis sin elparoli. Si bone scias ludu komedion, sed malgraŭe li tuj sentis ke ŝi mensogas.

« Sinjoro Dubois asertas ke li estis tie. »

« Nu, ĉu li diris tion? »

« Do estas vere? »

Si kokete sidigis en malaltan klubfotelon kaj bruligis cigaredon. La kimono akiris plu da libero.

« Kaj kio sekve? » Spite sonis ŝiaj vortoj.

« Mi dezirus scii, kiam precize sinjoro Dubois venis kaj foriris. »

Si ĉarme ridetis, ŝi tute reregis sin.

« Ĉu vi reprezentas la Ligon por la ŝirmo al knabinoj? »

« Ne, fraŭlino, la policon! »

Miro desegniĝis sur ŝia vizaĝo.

« Ĉu profesia manio ne faras petalojn al vi, sinjoro Kant? Mi opiniis ke estas plezurvojaĝo kaj vi volas fari ĝin asizafero! »

« Estas asizafero, fraŭlino Sterlen, » serioze diris la inspektoro.

Sia rideto malaperis.

« Kion vi volas diri? »

« Murdo okazis kaj mi deziras kontroli la tempuzon de ĉiuj veturantoj. Pardonu min, sed la kazo estas serioza. »

kiel Kant duontimis. Si disponis bonajn nervojn, tiu koketa malgraŭ la savzono.

« Maxton! » Kant mallonge diris.

« Maxton!... »

« Jes. » Kaj plu dirante : « Kiam Dubois venis tien? »

« Je la dudektria kaj dudek kvin kaj li restis ĝis noktomezo kaj duono. »

« Ĉu vi certe scias tion? »

« Jes. Mi ja memoras ke mi diris ke la nova tago jam aĝas duonhoron, kiam mi ellasis lin. »

Stella Sterlen estis tre konciza, kiam necese.

« Ĉu vi scias ĉu tiam ankoraŭ bonvetteris? »

« Mi rimarkis ke estis pli da vento kaj pluvetis. »

« Kiel vi scias tion? Ĉu vi eliris? »

« Ne, mi aperis la ŝukojn por peli la cigaredofumon for. »

« Ankoraŭ unu demando : Ĉu la tutan tempon vi restis kune? Mi volas diri : Ĉu Dubois ne forlasis vin momenton, ja eĉ ne momenton? »

« Ne. La tutan tempon ni parolis pri dancmuziko. » Si ridetis.

« Ĉu vi jurus tion? »

« Jes. » Sonis decide. « Ni parolis pri muziko. »

« Tio ne tiel gravas », la supra lipo de Kant kurbigis. « Mi volas nur scii ĉu vi formale konfirmas ke Dubois ne lasis vin unu minuto sola? »

« Sinjoro Kant, ne dubu pri tio. Ĝis precize noktomezo kaj duono li ne iris for de mi momenton, ne unu momenton. »

« Feliĉe por sinjoro Dubois. » Li volis foriri. « Mi ne deziras pli longe ĝeni vin. Pardonu » Li jam tenis la klinkon.

« Kiu... » ŝi hezite demandis.

Kant divenis ŝian demandon.

« Ne jam trovita... Promesu al mi provizore resti en via ĉambro. Bone fermu la pordon! Bonan nokton! »

Kiam li ree penetris en la kajuton de Dubois, tiu lasta ankoraŭ ĉiam fiksigardis la plankon.

« Kion si diris? » li hezite demandis.